

Orgaan
van de Bond van
Arbeiders-
Esperantisten FLE

Laborista



Esperantisto

In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Npveustraat 33 II, Amsterdam-17, telefoon (020) 82177
Peningmeester F.L.E., Wingerdweg 53, Amsterdam-19, postgiro 331133 - Boekendienst F.L.E., Marnixstraat 57, Haarlem, postgiro 111278

SAT-kongresa Gvidrezolucio

La 39-a Kongreso de SAT, en Swanwick, aprobinte unuanime la ĝeneralan kaj finnancan raporton de la Plenum-Komitato, aprobinte same la raportojn de la diversaj instancoj de la Asocio, konstatas kun kontento, ke la gekamaradoj reagis pozitive al la voko de la Karlsruhe Kongreso, en pasinta aŭgusto, por daŭrigi la monokolekton „Alarmo” ĝis maksimuma sumo antaŭfiksita, tiel ke estas bona perspektivo por fini ĉi tiun kolektadon antaŭ la jarfino 1966:

dankas al ĉiuj, kiuj bonvolis mondonaci, aŭ por „Alarmo”, aŭ por pliampleksigo de nia organo „Sennaciulo”, paŝo kiu signifas seriozan plifirmigon survoje al nia idealo; konstatas plezure la persistajn klopodojn de la prizorgantoj de la Junul-Fako por publikigi pli kaj pli interesan organon („La Juna Penso”) kaj varbi laŭpove inter la laborist-esperantista junularo, kaj vokas ankaŭ la plenkreskulojn helpi ĉiuloke, kie la cirkonstancoj tion ebligas, rekomendante abonon;

dankas al la redakcio-administracio de „Nia Voĉeto”, kiu helpas al niaj infanoj diligente starigi kontakton kun la SAT-medio;

esperas, ke la progresanta koordinado de la propaganda laboro ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj per pluaj pozitivaj rezultoj sekurigos la estontecon de nia monda asocio;

fidas al la instancoj de SAT por kunlabori, kiam necesas, sur lingva tereno, kun aliaj esperantistaj organizoj, kondiĉe ke tiu kunlaboro ne kontraŭu al niaj idealoj;

konstatas, kun indigno, la pluekziston de milit-fokuso en sudorienta Azio, kiu grave endangerigas la tutmondan pacon;

bedaŭras la ekziston de fanatika naciismo, ofte sub formo de ŝovinismo, kiu respondecas pri multaj konfliktoj kaj bremsas la unuiĝon de la homaro;

kondamnas la atombombajn prov-eksplodojn kaj la stokadon de tiuj armiloj. Senrezerve malaprobas la uzon de ĉiuj militiloj, klasikaj kiel modernaj;

vokas fine al ĉiuj laboristaj esperantistoj tra la mondo ekkonscii pri la neceso de sennacieca kaj paciga agado kaj sekve neceso aparteni al organizo, kiu praktikas la esperantan lingvon por la kreado de nova soci-ordo sen milito, sen malsato kaj sen raspartigo.

Ĉe U.E.K., la kunlabora komitato de la esperantistoj en Utrecht, la 3-a de septembro 1966 estas markita per verda asterisko. Tute prave, ĉar en tiu tago la urbestro de Utrecht, Lia Moŝto De Ranitz, metis la kronon sur laboron plurjaran, per inaŭguro kaj akcepto, por la komunumo, de monumento honore al D-ro Zamenhof. La historio pri la disvolvigo de ĉi tiu afero estas nur parte konata. En la jam longe ekzistanta komitato naskiĝis la ideo pri monumento. Por kolekti la monon, oni komencis la vendadon de glasoj kun bildo de Zamenhof, alumetoj kun propagando-etiketoj, globkrajonoj ktp. Samtempe per anoncado en la Esperanto-gazetaro oni petis por financa subteno, ankaŭ de ekster la

Tiu el Linz estis s-ano Geroldinger, la iniciatinto de la monument-kampanjo tiuloke. Ankaŭ la nestoro de la utrecht-a Esperanto-movado, 81-jara sed ankoraŭ vigla s-ano Baaten, estis veninta.

Post konsumado de la kafo ĉiuj iris al la monumento, kiu ankoraŭ estis kovrita per granda Esperanto-flago. Post bonveniga kaj enkonduka parolado fare de la prezidanto, s-ano De Greef, lia urbestro Moŝto parolis kaj danke akceptis la monumenton, kiel donacon al la urbo, de la esperantistoj. Li alte taksas la strebadon de la esperantistoj, malgraŭ tio, ke li ne estas konvinkita pri la nemankipovo de la lingvo internacia. Estis ĉe la inaŭgura solena s-ano Veldhuizen, instruisto, kun nombro da ge-

Ni semas kaj semas konstante . . .

urbo. Multaj gesamideanoj malavare mondonacis.

Intertempe komenciĝis la „prilaborado” de la komunuma estraro. Promeso pri nomado de aleo en nov-konstruota kvartalo akiriĝis. Unu el la membroj de la urba komisiono pri belartoj desegnis la projekton de monumento. Artisto en amsterdama muldejo faris projekton por bronza plato kun la bildo de d-ro Zamenhof. Firmo en la supro de Nord-Holando fabrikis la postamenton.

Montriĝis, ke sufiĉas la kolektita mono. Komenciĝis la atendado, ĉar ne estus konvene meti monumenton en sovaĝejo, kiu vokas imagbildon pri la vortoj: Kaj la tero estis senforma kaj dezerta. . . .

Dume la komitato aktivis por ke „Estiĝu iam klara tag!” kiel inda kulmino de grava laboro. Kaj ĝi sukcesis! Danke la komitatoj memoras la malavaran subvencion el multaj flankoj. Multege da laboro estas farita kaj tiurilate estas nepre menciinda la nomo de s-ano Bergman, kies inspira agado entuziasmigis kaj antaŭenpelis liajn kunlaborantojn. En la tago de la inaŭguro la prezidanto, s-ano De Greef, prave memorigis tion.

Inter la 10-a kaj la 11-a horoj de tiu memorinda sabato granda nombro da interesiĝantoj kolektiĝis en la kantino de la Vardisporta Centro de la nova kvartalo „Overvecht”. El Roterdamo, Hago, Amsterdamo, Amersfoort, Leeuwarden, sed ankaŭ el Düsseldorf kaj Linz (Aŭstrio) alvenis la gastoj de la komitato.

knaboj, kiuj per Esperanto-kantoj pli-intensigis la festan etoson.

Posttagmeze la komitato aranĝis akcepton en la bela t.n. Nova Salono de N.V.-Huis. Ankaŭ tie la geknaboj kantis kaj s-ano Leenhardt el Bussum deklamis memverkitaĵajn poemojn. Gratule parolis sin-

(Kliŝo „De Esperantist”)





Esperanto monument in Leeuwarden onthuld

Cliché Leeuwarder Courant

Een kleed, nog groener dan het omringende gras, onttrok zaterdagmiddag de sculptuur, die Tjeerd Visser uit Duurswoude vervaardigde op uitnodiging van de Frisa Esperantista Rondo, aan het oog, toen enkele tientallen genodigden en vele „losse” belangstellenden zich verzamelden in het naar de „uitvinder” van het Esperanto, dr. Zamenhof genoemde park aan de Pasteurweg. Burgemeester Harmsma zou het beeld onthullen, waarna mej. W. Steffering, voorzitter van de Rondo het beeld i. de zorg van het gemeentebestuur aanbeval. De burgemeester reageerde lachend met „we zullen deze zware zorg graag op ons nemen”. Daarmee doelde hij op de een

Met het wegnemen van een groen kleed onthulde burgemeester Harmsma het door Tjeerd Visser vervaardigde Esperanto-monument.

dag voor de onthulling aangebrachte vernielingen. De jeugd gebruikte de sculptuur zelfs als „speelplaatje”.

sekvé reprezentantoj de F.E.N., U.E.A., F.L.E., K.U.N.E., N.G.G.E., I.F.E.F., F.E.R.N. kaj A.N.S.E. Por „Antaŭen Ciam” parolis s-ano Kho. Aparte al la ĉeestantaj geknaboj sin turnis la nedtruebla pioniro Van Wijnen el Zeist.

Ne estas eble eĉ nur tre koncize raporti pri la paroloj de la reprezentantoj. Ĉiuj tamen esprimis sian grandan ĝojon pro la grava rezultato de sincera kunlaboro.

Dum la tuta tago la komitato de la samideanoj en Utrecht sin montris bona gastiganto. Pro ĉio, kion ĝi atingis per streĉa laboro, la tuta Esperanto-movado devas esti al ĝi danka.

Pinto.

Geedziĝis la 15an de oktobro 1966

magistro F. WINKEL
kun
kuracistino
A. G. J. A. VAN DE SAND

La Asocio prezentas korajn gratulojn al la nova paro.

Algemene Nederlandse Esperanto-Examen Commissie

Examens gehouden te Amersfoort op 28 mei 1966.

Geslaagd voor E: S-ino H. D. Beyne-v. Os, S-ro R. Wassenaar, Leiden. S-ino M. A. v. d. Kooij-Waal, S-ino C. M. H. Schoonman, S-ino T. v. Woerden, Den Haag; S-ino K. L. Munniksma-Bollen, Amsterdam; F-ino N. A. Boersma, Leeuwarden; S-ro J. W. Katoen, Rotterdam; S-ro J. H. A. le Blanch, Schiedam; S-ro R. Moerbeek, Emmeloord; S-ro R. v. Hees, Arnhem; S-ro J. F. Peters, Velp. Geslaagd voor M: S-ino M. v. d. Brink-Sonnenberg, Apeldoorn; F-ino R. M. B. Koopman, Leiden; S-ino A. M. Demendaal-Op den Brouw, Rotterdam; S-ro M. Stoop, Amsterdam; S-ino A. Noordewier-Jagtenberg, Leusden; S-ro P. Bos, S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, S-ro J. O. de Kat, Den Haag; S-ino B. Muizelaar-Borger, S-ino A. v. d. Pol-v. d. Berg, Haarlem; S-ro W. Nieuwenhuizen, Bunnik; S-ro W. Baris, Schiedam.

Geslaagd voor S: S-ino P. E. v. d. Werff-Geldmaker, Rotterdam; S-ro G. W. Dui-vis, Heemstede; S-ro G. F. Kool, S-ino J. T. Koopmans-Schotanus, Leiden; F-ino M. de Kunéry-Malinies, Den Haag.

Rob Kwantes el malsanulejo

La lan de oktobro k-do Rob Kwantes revenis hejmen. Dum sia restado en la sanatorio li multe spertis diversmaniere la amikekon, kiu speciale regas inter la geesperantistoj kaj denove ĉe lia hejmeveno. Tre sinceran dankon pro ĉio.

Fam. Kwantes, Haarlm

La Asocia estraro Kore gratulas pro resaniĝo.

Voorstel

met betrekking tot taalprobleem overhandigd aan V.V.

Een delegatie van de Wereldbond van Esperantisten (Universala Esperanto Asocio), die onder leiding stond van de voorzitter van de U.E.A., Prof. Dr. Ivo Lapenna, heeft 6 oktober j.l. aan de onder-secretaris van de Verenigde Naties, de heer C. V. Narasimhan, een voorstel overhandigd, waarin de Verenigde Naties wordt gevraagd het internationale talenprobleem op te lossen door daadwerkelijke en doeltreffende medewerking aan de verbrediging van de neutrale internationale taal Esperanto, onder meer door de Staten-Leden aan te bevelen het onderwijs van deze taal te bevorderen en gebruik er van in de internationale betrekkingen tussen de volkeren te stimuleren.

Het voorstel werd ondertekend door 919.895 personen uit 74 landen en bovendien door 3840 organisaties namens meer dan 70.000.000 leden. Onder de individuele ondertekenaars bevinden zich 114 staats-hoofden en regeringsleiders, 1359 parlementsleden, 995 taaleleerden, 6926 Nobelprijswinnaars, leden van wetenschappelijke akademies en hoogleraren, 6688 schrijvers en journalisten, 51.913 onderwijzers en leraren, 58793 beoefenaars van vrije beroepen (doktoren, advocaten, zakenlieden), 273517 studenten en scholieren, 366214 ambtenaren en werknemers uit het vrije bedrijf, 27446 boeren en tuinders, 58839 huisvrouwen en 67091 personen met overige beroepen.

Tot de voornaamste Nederlandse individuele ondertekenaars van het voorstel behoren: Dr. W. Drees, Minister van Staat, E. Meester, secretaris van de Partij van de Arbeid, G. E. van Walsum, oud-burgemeester van Rotterdam, Prof. Dr. C. C. Berg, bestuurslid van de Nederlandse UNESCO-commissie, Prof. M. G. J. Minnaert, lid van de Nederlandse Akademie van Wetenschappen, Prof. Mr. J. v. d. Hoeven, rector aan de Universiteit van Amsterdam, Prof. Dr. J. Kok, oud-rector aan de Universiteit van Amsterdam en verscheidene leden van de Tweede en Eerste Kamer der Staten-Generaal.

De belangrijkste Nederlandse organisaties, die het voorstel namens hun leden ondertekenden, zijn o.a. Partij van de Arbeid, NVV en de VARA en vrijwel alle Nederlandse Onderwijzers-organisaties.

De delegatie, die het voorstel overhandigde bestond uit: Prof. Dr. Ivo Lapenna, voorzitter van de Wereldbond van Esperantisten, mejuffrouw M. H. Vermaas, directrice van het Centraal Bureau van deze organisatie te Rotterdam, de heren Eskil Svane, namens de Esperanto-club bij het Secretariaat van de Verenigde Naties, Francis Helmuth, namens de Amerikaanse Esperanto-organisatie ELNA, Mark Starr, namens het Esperanto Informatie Centrum te New York en Dr. H. Tonkin, namens de Esperanto-Jongeren-Organisatie TEJO.

Examen Esperanto l.o. 1966

Tekstverklaring

(14.00—16.30 uur)

Lees eerst de tekst aandachtig door en beantwoord daarna de hiernaast gestelde vragen 1 t/m 14 in het Esperanto. Vertaal hierna het in vraag 15 genoemde fragment.

Liberecon ni absolute bezonas, se ni volas, ke la lingvo restu facila, kaj, kio estas pli grava, ke ĝi ne fariĝu el vivanta lingvo, en kiu la instinkto ludas sian rolon, ia lingva sistemo en kiu nur rezonado regus.

Kaj vere, en tio kuŝas la tuta konflikto inter kelkaj Esperantistoj. Al unuj tio, kio precipe plaĉas, estas la logikeco de la lingvo, ĝia reguleco kiujn ili dezirus ankoraŭ pli perfektaj, Esperanton ili ŝatas pro ĝia sistemeco kontraŭ la ceteraj nesistemaj, „eraplenaj” lingvoj.

Aliaj Esperantistoj kontraŭe, — kiuj estas nek malpli lertaj nek malpli kleraj, — opinias, ke la ĉefa merito de Esperanto, ke ĝia neduba efektiva supereco kompare kun aliaj artaj lingvoj, konsistas ĝuste en tio, ke ĝi, — vera miraklo! — sukcesis akceptigi sin kiel naturan lingvon ne sisteme korektotan, perfektigotan, pleniĝotan, ... ne diskutotan, sed tuj uzotan. La ĉiama, konstanta tendenco de la unuaj, teoriemuloj, estas forigi la (laŭ ilia juĝo) mankojn de la lingvo: nelogike formitajn vortojn, nesufiĉecon de l'vortaro, k.t.p. La progreson ili atendas de ia reganta Akademio, kiu „farus” la lingvon. Ilia metodo, vole-nevole, estas pli malpli a-priora, monopolema, aŭtokrata. La fonton de la vivo ili serĉas en direktantaj institucioj, ekster kiuj ili vidas nur anarkion.

La ĉiama, konstanta tendenco de la duaj, praktikemuloj, estas, — neniam diskutante ĝin, — enradikigi la lingvon tian, kia ĝi estas, en la ĉiutaga, komuna internacia uzado. Ĝian plenan taŭgecon ili ja konstatis kaj, ĉar por ili la problemo estas pli socia ol pure lingvistika, ilin kontentigas tia taŭgeco.

La progreson ili atendas de tiuj mem, kiuj uzas la lingvon kaj detiuj ĉi ili postulas nur, — por eviti la antaŭviditan anarkion, — plenan sinceran respekton al la Fundamenta leĝo de la lingvo. Al ili sufiĉas, ke tute trankvile, malrapide la Akademio konstata la naturan, regulan evoluadon kaj ĝin kontrolu, tial ke la tasko de la Akademio, krom sankcii, estas ankaŭ kontraŭstari al tio, kio ŝajnas al ĝi ne konforma al la spirito de la lingvo, sed eĉ tiam simple per ne akcepto, per ne oficialigo kaj ne per malpermeso aŭ kondamno. Ilia metodo estas nepre aposteriora, liberala, demokrata. La fonton de la vivo ili serĉas en la esperantista popolo, konvinkite, ke ĝi estos sufiĉe saĝa kaj singarda, por uzi, sed ne trouzi la necesan liberecon kaj ne pravigos per ia lingva sabotado la necesecon de savanta reganta povo.

(El artikolo de Prof. Cart en Lingvo Internacia de junio 1913)

A.

1. Kiujn du eblojn Prof. Cart konstatas en 1913 por la estonta evoluo de Esperanto?
2. El kiuj elementoj de la unua alineo montriĝas klare, kiun el la du ebloj Prof. Cart mem preferas?
3. Kia vi imagas lingvan sistemon, en kiu „nur rezonado regus”?
4. Kial la aŭtoro metis la vorton „eraplenaj” inter citilojn?
5. En la dua kaj tria alineoj prof. Cart kontrastigas du opiniojn. Prezentu tiujn opiniojn per viaj propraj vortoj.
6. Kial Prof. Cart nomas la unuan partion „teoriemuloj”, kaj kiel tiuj volas atingi sian celon?
7. Kial la praktikemuloj ne emas diskuti la lingvon?
8. Ambaŭ grupoj volas eviti anarkion. Kiamaniere?
9. Kio estas por la dua grupo la rolo de la Akademio?
10. Kial Prof. Cart nomas la metodon de la dua grupo demokrata kaj a-posteriora?
11. Kio estas via propra starpunkto en ĉi tiu disputo?
Motivigu vian respondon.

B.

12. Klarigu la signifon de la vortoj: anarkio, a-priora, aŭtokrata, evoluo, lingvistika, sabotado, sankcii.
13. Kio estas la diferenco inter: precipe - principe
singarda - prudenta
diskuti - disputi - kontesti - refuti
respekti - estimi - ŝati - plaĉi
14. Formu kvin frazojn, ne tro mallongajn, kiuj enhavu la vortojn: miraklo, korektiĝi, monopolo, rezisti, liberala.

C.

15. Traduku la unuajn tri alineojn en la nederlandan lingvon.

Ter vertaling in het Esperanto

(10.00—12.00 uur)

(Niets overslaan en niet op twee manieren vertalen)

Onze medewerker Gerard J. M. van het Reve schreef voor de jeugd een boek over de geschiedenis van het vuur, dat in een ver, ver verleden verloren raakte.

Een jagersstam, die zich een onderdak heeft gezocht in grotwoningen van het stenen tijdperk, wordt er overvallen door een van de Grote Winters, die de wereld van toen geteisterd hebben. Tijdens een vlucht voor de koude en de stormen overkomt hun een nieuwe ramp: ze verliezen het vuur.

Misschien heeft de schrijver de ijsperiode wat al te bruusk laten aanbreken, want de overgang van een mild naar een Siberisch klimaat heeft stellig eeuwen in beslag genomen. Maar aan de spanning van het verhaal komt het uiteraard ten goede, als die verandering in een korte overgangstijd wordt samengeperst.

OPGAVE 5

Het is bekend, dat de inwoners van Amsterdam in de loop der jaren veel bijnamen gehad hebben.

De oudste is „waterhonden”. Die hebben de Geldersen hun gegeven in 1508, toen velen van hen na een aanval op Amsterdam, in het toentertijd brede IJ tussen Diemen en Schellingwoude verdronken. De kraakzindelijke Waterlanders noemden hen in vroeger eeuwen „stoepe...”, vanwege de uitwerpselen van de Amsterdamse honden, die men overal aantrof (en trouwens nog steeds aantreft).

VERTALING VAN OPGAVE 4.

Aŭtovojoj havu nomojn anstataŭ numerojn. Ĉi tion proponas la asocio „Nia lingvo”. Miloj veturas ĉiutage sur la vojo Breda-Tilburg-Eindhoven, ne sciante ke ĝi estas ŝtata vojo sesdek tria, kvankam aŭtovojoj laŭ ekonomia vidpunkto estas ne malpli gravaj ol riveroj.

„Nia lingvo” ligas sin kun profesoro-doktoro C. A. Zaalberg, kiu jam sugestis nomojn. Li opiniis ke oni povos pripensi nomojn kiaj: Piet Hein aŭ Willemien.

En la lernejo infanoj ankoraŭ ofte devas respondi demandojn kiaj: laŭ kiuj akvo-vojoj veturas ŝipisto de Groningen al Nijmegen?

Oni povas iom post iom forigi la ŝipistojn el la ekzamenoj.

Infano en nia tempo, tiel „Nia lingvo” devus scii kiel oni laŭ plej bona vojo iras de Zwolle al Middelburg.

Nomkonuloj jetu sin sur la problemon kun iom da distra kuraĝo.

Ĉu ĉi tie ankaŭ estos ŝancoj por la Esperanto-movado?

Het vuur kennen deze jagers dus al. Ze hebben het in de natuur aangetroffen: een vulkanische uitbarsting, een boom, die door de bliksem is getroffen. Het komt er nu voor hen op aan dit vuur brandende te houden en dit is verre van gemakkelijk. Een poëtische herinnering aan de wacht bij het vuur is nog bewaard gebleven in de geschiedenis van de Vestaalse Maagden, die met hun vieren tot taak hadden het vuur in de kleine tempel brandende te houden. Wanneer dit uitdoofde, betekende dat rampspoed voor de Romeinse staat, zoals het voor de jagersstam uit het stenen tijdperk een groot ongeluk was, als het vuur verloren ging, gelijk in het boek van Van het Reve. Deze laat nu een tweetal jongens erop uit gaan om het verloren vuur te zoeken. Ze komen in aanraking met een stam, waar men vuur maakt met „de heilige witte steen”, een soort brandglas, dat de zonnestralen samenbundelt en deze mensen in staat stelt het vuur rechtstreeks van de zon te betrekken. Maar de jongens hebben de vulkaan, de bliksemstraal en de zon niet nodig, want ze komen in het bezit van een stuk ijzerpyriet*), waaruit ze vonken kunnen slaan. En nu maken ze het vuur zelf.

Zo heeft de mens zich voor de zoveelste keer losgemaakt van het Toeval en zelf het Lot in handen genomen.


(Uit De Vacature van 4 januari 1966)

*) fera piritto.

Lernu ludante, ludu lernante

J. W. Minke

Neniun solvon preparolendan mi havas. Tiun ĉi fojon mia tasko estas do facila: mi bezonas nur prezenti al vi la novan enigmon.



La priskribo de la vortoj trovendaj estas:

Horizontale: 2. tion oni povas fari per revolvero (*); 4. karesa nomo por via patrino; 6. osta elstarajo ambaŭflanke de pied-artiko; 8. frote purigi objekton; 9. organo, kiu sekrecias la urinon; 11. konjunkcio, montranta la konkludon; 12. ŝildo de la greka diino Palaso (figure: ŝirmo; projekto); 14. prepozicio, signifanta disdividon; 16. senornama, senfantazia, seninteresa; 18. virina estulo; 19. laŭdire ĝi estas saniga por ĉiu (*); 21. asketo; Hinda mahometana piulo, celanta perfektigon per korpaj turmentoj; 23. speciale preparita felo, uzata kiel vesto (**); 25. kontraŭa; 26. ano de protestanta sekto; 27. loko en la centro de cirko por bataloj kaj ludoj (*); 28. persono kun kiu vi havas rilatojn, ofte amikajn; 30. kovri per nenormala superfluo da akvo; 32. vorto per kiu oni distingas iun aŭ ion; 33. pastra ĝispieda mesvesto (*); 35. rektangula; 36. nedifinita, komuna prepozicio; 37. karakteriza persona maniero esprimi siajn pensojn; 39. prefikso esprimanta parencecon; 40. sentara; 42. sendanĝera ulcereto en la buŝo; 44. emocie, elvokante emociojn (adv.) 46. nedifina nombra adjektivo; 47. adjektiva formo de iu numeralo.

Vertikale: 1. senutile, senefike (adv.); 2. igi malbrile blanka; 3. mallarĝa, longa, tre profunda golfo, kies bordoj estas krutaj; 4. malpli rapide ol „kure” (adv.); 5. grasa fluaĵo; 6. persona pronomo; 7. sufikso por derivi numeralojn; 8. sciigi al iu, ke li devas veni; 10. juvelŝtono (*); 11. ĉefprofesoroj de universitata fakultato (pluralo); 13. enigi vivantan branĉeton en alian vegetaĵon; 15. okono de cirklo; 16. eleganta ĉambro por ricevi vizitantojn (*); 17. nordpolusa regiono; 19. granda rabobesto „la reĝo de la dezerto”; 20. spiralforma, formanta plurajn kurbojn; 21. aparta branĉo de scienco, arto kc. (*); 22. kokino „donas” ĝin al ni; 23. prepozicio; 24. malkonfesi; 29. „tiel estu!” (hebrea vorto); 31. granda aro da domoj, aranĝita laŭ stratoj, placoj ktp.; 33. ambasadoreja oficisto; 34. havanta koloron de neĝo; 37. ŝmirpentri muron (*); 38. okazanta multe da fojoj; 41. sufikso; 43. trinkajo tre ŝatata en nia lando (*); 45. norda cervo kun larĝaj kornoj.

Sendu vian solvon al J. W. Minke, Vee-teelstr. 144, A'dam-6 plej laste 15.11.66. Bela premio povas esti via rekompenco!

(*) nur la radika formo;

(**) akuzativa formo.

Esploru vian scion!

H. Kuijt

OPGAVE 6

Glaasje op, laat je rijden!

Wat doet de man die met een glaasje op achter het stuur van zijn auto plaats neemt en gaat rijden?

Niets anders dan dit: Hij vermindert de werking van zijn zintuigen, zijn reacties worden vertraagd, zijn denkvermogen vertroebelt, kortom hij is zijn voertuig niet meer meester. Hij gaat wat te ver naar links, merkt het, draait aan zijn stuur en dan gaat hij te ver naar rechts.

De politie ziet zijn rare manoeuvres, gaat er achter aan en dwingt hem tot stoppen. Mijnheer moet uitstappen en dan wordt hij door de politie getest. Deze constateert: bloeddorpen ogen, waggelende gang, dikke tong, wartaal.

Toch heeft hij nog geluk gehad; er hadden doden kunnen vallen. De politie heeft hem op tijd ontdekt.

Mijnheer moet voor de rechter verschijnen die de uitspraak doet: een week gevangenisstraf en acht maanden niet rijden.

De wet zegt immers daarvan dat zo iemand niet in staat moet worden geacht een motorrijtuig te besturen en de wet verbiedt dan het rijden.

VERTALING VAN OPGAVE 5.

Dum jarcentoj Laponio estis tute izolita de la ekstera mondo. Ne ekzistis kontakto kun moderna Eŭropo kaj eble ankoraŭ nun estus tiel, se oni ne estus konstruintaj vojojn mallonge antaŭ la lasta mondmilito.

Longaj asfaltvojoj boris sin tra la solecan landon el marĉoj, neĝo kaj glacio malfirmante la regionon ne nur por ĝenerala progreso sed ankaŭ por pereigaj influoj. Grava malamiko estis alkoholo, la t.n. „fajroakvo”, kiu iam detruis grandan parton de la indianoj.

Multaj laponoj elspezas sian tutan monon por drinkaĵoj kaj, ĉar ili laŭ normala vojo malfacile estas aĉeteblaj, oni mem sekrete zorgas por la preparo. Ĉi tiu alkoholo, preparita el ligno estas unu el la plej malsanigaj specoj, kiuj povas konduki al frenezeco. La vojo al moderna civilizado iras kune kun ĉiuspecaj malfacilaĵoj; tio validas precipe por la junularo.

NE UNU

Legante raporton pri eksterlanda vojaĝo de unu el niaj amikoj, mi haltis ĉe la frazo: „Amikajn servojn nu unu fojon faris al mi esperantistoj.”

Kion la aŭtoro volis diri per tiuj vortoj? Ĉu li laŭdas aŭ mallaŭdas la konduton de la esperantistoj?

„Nu unu fojon” ja povas signifi ne nur „pli ol unu fojon”, sed ankaŭ „malpli ol unu fojon”!

La frazo do estas miskompreniga. En laŭda senco li devis skribi: *ne nur unu fojon* aŭ: *pli ol unu fojon*; en senco mallaŭda li devis skribi: „*eĉ nu unu fojon*”. En alia organo mi legis: „Jam sur la Balkanoj la rilatoj inter la najbaraj popoloj ne estis amikaj, sed tute male: *ne unufoje* ili militis inter si.”

La samajn vortojn oni povus uzi en jena frazo: „Nun la rilatoj inter la najbaraj popoloj dum multaj jaroj estas amikaj: *ne unufoje* ili militis inter si.

La samaj vortoj, sed kun inter si kon-

Ĉu Esperanto vere vivas?

J. Ph. Punt

OPGAVE 4

Zeldzame geluiden

Er zijn ook tal van geluidsjagers die er een eer in stellen „moeilijk bereikbare” geluiden vast te leggen, zoals de brongeluiden van bepaalde dieren of zeldzame natuurgeluiden, zoals het spuiten van een geiser of de uitbarsting van een vulkaan. De draagbare bandrecorder en de „zakrecorder” hebben het internationale toerisme een nieuwe dimensie gegeven; de „geluidstoerist” hanteert zijn bandrecorder zoals de amateurfotograaf zijn camera, en legt markante vakantiegeluiden voor later vast. Een fascinerende — en reeds veel toegepaste — mogelijkheid is de registratie van geluidseffecten en commentaren „ter plaatse” bij het maken van kleurendia’s of smalfilmopnamen. Een kleurendia van een machtige waterval wanneer men tijdens de projectie ook het bijbehorende geluid ten gehore kan brengen, met het ter plaatse uitgesproken commentaar van medevakantiegegers.

VERTALING VAN OPGAVE 3

La ĉasado de sonoj

Ŝatokupulo pri sonoj en la jaro 1966 havas je dispono mirigan arsenalo da aparatoj kaj ebloj. Ankaŭ ne havante fakan kapablon, „la homo kun la magnetofono” en nia epoko estas reganto sur tereno, kie laŭ propraj gusto kaj temperamento li povas senbridi nepre aŭtonome kaj kree. Laŭ propra elekto li estas komponisto kaj okestra ĉefo, ĉasisto aj esploristo, sonbilda reĝisoro kaj radioreportisto. Eĉ li estas reganto super la naturaj prafortoj.

Ĉu fulmotondron? Bagatelo! Sufiĉas forte blovi en la mikrofonon, skui plateton de lado aŭ frapi kelkajn akordojn per fortepiano kaj reprodukti tiujn je duona rapideco.

La farado de privata sonludo per la voĉoj de parencoj aŭ amikoj, por multaj fariĝis fonto de intens ĝojo kaj kontentiĝo.

Plej ofte la efektoj prezentas malpli da problemoj ol la vivantaj partoprenantoj. La ŝatokupulo pri sonoj faligu rizon aŭ sukeron sur streĉitan folion de papero kaj tiel per simplaj rimedoj produktos konvinkan „pluvegon”.

Li kapablas kurigi tra la ĉambro ĉevalojn, interfrapante du duonajn ŝelojn de kokosa nukso, igi bremsi aŭtomobilon grantante per metala objekto vitroplaton kaj veturigi lokomotivojn interfrotante pecetojn da ligno kovritajn per sablopapero. Piedradon en la neĝo li kreas kne-dante terponon farunon per la fingroj kaj aŭtentikan arbarbrulon li kondukas en la hejmon rompante antaŭ la mikrofonon alumetojn kaj samtempe ĉifante peceton de celofano aŭ frakasante alumetan skatolon. La „sonreceptlibroj” estas amuza legaĵo kaj la memfarado de sonoj ofte estas pli kontentiga ol la „uzopretaj” sonefektoj akireblaj per gramofona disko.

traŭaj signifoj! Estas vere, ke la kunteksto helpas trovi la ĝustan signifon, sed ĝi faras tion ne tuj. Tial estas pli bone skribi en la unua frazo: *ne nur unufoje*, aŭ: *pli ol unufoje*, kaj en la dua: *eĉ ne unufoje*. F.F.

La eksperimenta Esperantokurso en la muelejo de metilernantoj

Proverbo diras: ĉiu komenco estas mal-facila. Alia slogano diras: unu ago pli valoras ol mil vortoj. Jen en du frazoj la esenco de la eksperimenta Esperantokurso en Malval (Francujo) de 17 ĝis 30 aŭgusto 1966.

La origina celo estis, ke volontuloj sekvu dum kvar tagoj tre intensan kaj tre efikan instruadon. Ĝenerale ili partoprenas la konstrulaboron en la „Muelejoj de Metilernantoj” interkomprenante nur malfacile. Pro la kvartaga Esperanto-instruado ili tamen devus venki tiujn malfacilaĵojn, uzante inter si la internacian lingvon dum la laboro.

Tiu celo ne estis atingita, ĉar 6 horoj da instruado ĉiutage montriĝis troa postulo. Tial dum „nur” 4 horoj ĉiutage la 20 (poste 15) lernantoj ekzercis sub gvido de la instruisto André Gimbert. Je la fino de ĉi tiu kurso, kiu entute ampleksis 9 tagojn (do 32 horojn), la gelernintoj jam tiel bone komprenis la lingvon ke ili certe jam multe estus uzintaj ĝin, se la fremdaj ĉeestantoj estus estintaj pli multnombraj. Fakte ĉeestis nur unu brito, unu hispano, du nederlandanoj kaj unu ĉeĥo. Respondecoj kaj lernantoj cetere ĉiuj estis francaj.

Eble same efika kiel la „kurso” montriĝis la tradiciaj kantoj el pluraj landoj. La tuta repertuaro fariĝis, dank'al gitaristo José, ŝatata deserto post la manĝoj, kaj je aliaj okazoj. Ludoj, teatraĵetoj kaj aliaj amuziĝoj plie donis al la lernado ferian koloron. Dum la semajnfino pluraj francaj esperantistoj serĉis ĉi tiun idilian angulon por pasigi kelkajn horojn aŭ eĉ tagojn kun la esperantista kolektivo.

Esperanto en la radio

De VARA/Nederlando ni ricevis longan leteron pri ĉesigo de elsendoj „Socialistaj novaĵoj en Esperanto”. Esperige estas ke ili skribis, ke tiu decido neniel signifas ke VARA perdis sian interesigon por tiu ĉi mondlingvo, nek por nia Asocio. Kontraŭe montriĝas el ĝia propono en la Programkonsilantaro de Nederlanda Radio Unio, en la estonteco doni lokon al Esperantokurso.

VARA mem — kiel en la estinteco — en propraj elsendoj konvenokaze kaj por aktualaj aferoj volonte petos la atenton de la aŭskultantoj por viaj celoj, skribis VARA. Radio Praha informis ke sekve de aranĝoj de la elsendotempo de la eksterlanda disaŭdiĝo por Aŭstrio, Esperanto ne plu estas vicigita en la aŭtunan programon.

Sciigo de la Radio-Servo de F.E.N.

Aldone al nia antaŭa komuniko ni bedaŭrinde nun devas sciigi al vi, ke ankaŭ la VARA ĉesis la elsendojn en Esperanto („Socialistaj informoj en Esperanto” vendredvespere) ek de oktobro.

La Esperantistaro nepre reagu!

Klopodoj ĉe TROS-KOMPAS pri enpresigo de la E.-elsendoj ankaŭ ne havis sukceson pro la koncizeca formo de tiu gazeto.

Ni do nun pripensu, ke nur la VPRO faras gravan propagandon por Esperanto, menciante en „Vrije Geluiden” ĉiutage niajn elsendojn. Ni rekompencu ilin per abono. La adreso estas: VPRO, Postbus 11, Hilversum. W. Böttcher.

La loĝado estis tute laŭ la pioniraj kondiĉoj de la muelejoj: oni loĝis en tendoj apud la rivero Creuse, kies akvofoletoj tage kaj nokte obtuze bruas. La malnova muelejo kun la kvar grandaj muelŝtonoj kaj la tri metrojn alta rado el ligno, kaj kun kelo tra kiu la akvo vigle torentis, estis la ĉefa kunvenejo, manĝejo, kuirejo. Tie oni ankaŭ aŭskultis kiel la veterano Jean Villard rakontis sian historion.

La eblecon por ĉi-ĉio kreis la Asocio de la Muelejoj de Metilernantoj, kies prezidanto, Tonton (Chareille), jam delonge agnoskis la praktikan valoron de Esperanto kiel kontakt-lingvo por la miloj da diversnaciaj volontuloj kiuj ĉiujare vizitis la (oficiale 18) muelejojn. En la unue fondita muelejo en Piot, 10 km. de Malval, troviĝas la „ĉefurbo” kun la sekretariejo kaj multaj pavilonoj, inter kiuj pavilono de Esperanto. La revuo de la Asocio ĉiunumere raportas per aŭ pri la lingvo. Laŭ ĉijara interkonsento inter la Asocio kaj TEJO, la muelejo de Malval estis rezervita por la kursanoj en la nomita periodo, kaj oni estis parte liberigita de manlaboro, favore al lernado. Reciproke, TEJO transprenis la tutan organizadon de la kurso, kiun plenumis verve kaj energie Jean-Pierre Boulet kun sia edzino.

Ĉiu komenco estas malfacila, ni skribis supre. Tamen, se temas pri komenco tiam devas sekvi daŭrigo. La uzo de Esperanto en la muelejoj estas tiel evidenta, praktike utila helpilo por internacia kompreniĝo, kaj la eblecoj tiel favore ekzistas, ke la nuna eksperimento laŭeble plivastiĝos, kvankam laŭ iom diferenca organiza formo.

Laŭ la interkonsento, kiun subskribis la Muelejoj kaj TEJO, la 20-an de aŭgusto en Malval, sekvontjare denove estos kursoj, sed ne en Malval. Ili okazos en la programo de la ĉefmuelejo Piot (60 km sude de Châteauroux), kaj se eble en pli da muelejoj en Francujo kaj Germanujo, dum eĉ pli longa tempo ol ĉi-jare. En kiom da lokoj dum kiom da tempo... tio dependas ĉefe de la instruistaj teamoj, kiujn ni esperas trovi. Ni serĉas kompetentajn, ne tro maljunajn instruistojn pri Esperanto, kaj krome gitaristojn kaj aliajn, kiuj kapablas elvoki entuziasman partoprenon de gejunuloj en ludoj, kantoj, teatraĵetoj, ktp. La postuloj estas ne modestaj: ili estu pretaj loĝi en primitivaj (sed feriecaj) kondiĉoj, instrui dum 3 horoj tage kaj krome okupiĝi pri amuzado dum iom da tempo ĉiutage, akordiĝi kun la amikeca etoso de la muelejoj, helpi en la laboro se necese, kaj fine: pagi siajn vojaĝojn kaj loĝadon mem. Tio lasta estos malpli ol 10 F. tage, ĉio inkluziva. Ili neniel bezonos respondeci pri aferoj aliaj ol instruado kaj (peresperanta) amuzado.

Por laŭeble efika instruado estus plej bone se antaŭe, ekz. dum Pasko, la ekipoj kunvenus en la muelejo kie ili laboros, por sekvi kelkajn tagojn da instrukcioj pri la spertoj ĉi-jaraj kaj pri la instrumentado kaj -enhavo. Pri tio lasta ni emas kredi ke plej taŭgas rekta metodo kun ekzercoj laŭ la strukturata metodo. La enhavo devus kiel eble plej multe adaptiĝi al la surlokaj bezonoj.

En la interkonsento TEJO metis apartan paragrafon, kiu klare esprimas la deziron kunlabori kun aliaj Esperanto-organizaĵoj,

ĉefe kun SAT-junulfako (SAT dum la pasintaj jaroj jam aktivis en la muelejoj) kaj Skolta Esp. Ligo, se ili tion deziras. La fakto, ke TEJO prenis ĉi tiun iniciaton neniel signifas iun ajn monopolon kaj espereble ĉi tiu praktika kaj inda projekto ebligos pruvon ke eĉ esperantistoj povas harmonie kunlabori laŭ la devizo de la Asocio de Muelejoj de Metilernantoj: „Amiĉie” (Amikeco).

Konkrete:

1) Kiu sentas deziron partopreni ekipon en Piot aŭ eventuale en alia loko en Francujo aŭ Germanujo (Osnabrück), bonvolu skribi antaŭ 1 decembro 1966 al ni.

2) Se aliaj organizoj (SAT-junulfako, SEL, kaj eventuale aliaj) pretas kunlabori, ili same bonvolu informi nin pri tio. La kunlaboro konsistos unualoke el trovado de instruistaj ekipoj.

3) Se la estraro de GEJ pretas helpi per ekkontakto de la muelejo de Osnabrück, akiro de ĝia konsento, kaj trovado de instruista ekipoj, ni ankaŭ atentus volonte ĝian reagon.

4) Se aliaj organizaĵoj por volontula servo (ekz. civila helpservo) interesiĝas pri simila eksperimento, ili bonvolu kontakti nin. Franclingva raporto estas havebla ĉe ni.

5) Esperantistoj, kiuj deziras ĉeesti preparan kunvenon en Piot, bonvolu informi nin antaŭ 1 decembro 1966. Tiu ĉi invito precipe koncernas la kandidatojn por ekipoj (vidu 1). Ni klopodos, se estos interesiĝo, akiri vojaĝ- kaj restad-stipendiojn por tiu printempa kunveno.

6) Ĉiuj redakcioj, radio-stacioj kaj aliaj personoj ricevintaj ĉi-tiun bultenon bonvolu laŭeble diskonigi ĝian enhavon, cele al varbado de ekipoj. Fotoj estas haveblaj ĉe ni.

Adreso: H. Bakker, estrarano de TEJO pri NEJOJ, Kastelenstraat 231, Amstterdam-Z., Nederlando.

Recenzoj

M. J. Lermontov (1814-1841) KAŬKAZAJ RAKONTOJ. El la rusa tradukis D. Staritsky. Eldonis U.E.A. Roterdamo 1964. Eldonita okaze de la 150-jara datreveno de la naskiĝo de Lermontov. Presita en Nederlando ĉe Zwagers Roterdamo. Antaŭparolo de B. Tornado. Prezo 5 ned. gld.

La libro 70-paĝa en paper-plastika bindo enhavas tri rakontojn, kiuj priskribas la spertojn de juna rusa oficiro, pune sendita al la Kaŭkazo por batali kontraŭ la montanaro, kiu ne volis subiĝi al la rusa ŝtato. Lia krimo konsistas el la verkado de akra versaĵo „Al morto de Puŝkin”, kiu atakis la tiaman socion. Same kiel Puŝkin Lermontov mortis juna. El la tradukitaj poemoj kaj jenaj rakontoj montriĝas, ke la rusa kaj la mondliteraturo perdis talentan poeton kaj proziston, kiu eble en kazo de plua vivo estus riĉiginta la rusan kaj nian literaturojn. Kiel ekzilito la juna oficiro spertis la belajn naturajn de la Kaŭkazo kaj la mildan klimaton de la Nigra Maro kaj pere de ĉi tiu esperanto-traduko ni, mondlingvanoj, povas ĝui en la viglaj priskriboj la samon, kio certe ne eblas en iu nacia lingvo, escepte de la rusa.

La bildriĉa rusa lingvo estas tradukita en flua simpla esperanto, kun tre modesta uzo de ĝenaj neologismoj. Tamen la tradukinto ne tut-anime vivas en nia lingvo, ĉar oni trovas diversajn strangajn stilaĵojn, kiuj eble por rusoj estas tute klaraj.

Ekzemple: *nigra plena de nebulo intermonto* (p11). *Kiun amuzi li alrajdis* (p35) *la tegmentojn de la ĉirkaŭantaj ĝin kabanoj* (p13) *Apenaŭ li aŭdos lian nomon, anstataŭ tuj kiam* (p30) *Ĝis konvinkigis, ke li maltrafis* (p24) *La fenestro rigardis postan korton* (p24) *Preskaŭ fordonis nin sub juĝon* (p15) *Elskuos eĉ anglan faritaĵon* (p47) *kaj kelkaj aliaj.*

Rektaj eraroj estas: *kreviĝas* (p16) *kiom da diversajn bagatelojn* (16), *respondeca pro* (p25) *forlasante post si, ni pluiris,* (p29), *malbonvetero* (p30), *distanco de cent klaftojn* (p35) *falsigi* (p58).

Krome okazas iom da malzorgado en la klarigaj notoj. La vorto *burko* ekz. okazas sur paĝo 13 kaj la noto sur paĝo 29. Samo okazas kun *urjadniko* kaj kun la loko-nomo *Kobi*. Granda neglekto okazis sur paĝo 29, kie la ripeto de unu sama frazo fuŝas la tekston kaj kie oni renkontas la vorton sendispute en du formoj: sendis pute, tre verŝajne misvido de la korektisto aŭ de la presisto.

Feliĉe la tradukinto ne cedas multe al la moderna facilemo kaj baldaŭa komfortigo. Multfoje oni uzas en tiu inklino simplan adjektivon, anstataŭ la genitivo. Sur paĝo 13 mi trovis: *Koljungaĵa sonorileto*, kaj poste sur paĝo 51 pli bone *ĵungsonorileto*. Unufoje mi trovis la uzon de *igi* anstataŭ *e-ata* *Mi morte frakasigis* (p19). La tradukinto ankaŭ bone observu la signifojn de la verboj *rekompenci* kaj *venĝi*.

Ĝenerale oni ne trovas en jena traduko la multajn originalajn trafikajn tradukojn de la malnovaj rusaj tradukintoj, ekz. de ŝidlovskaja. Tamen pro la simpla kaj ĉarma Esperanto, malgraŭ multaj malgrandaj mankoj jena libro estas rekomendinda kiel distra kaj kelkfoje kortuŝa legaĵo. Sur la lastaj paĝoj oni trovas liston de ĉiuj verkoj de Lermontov tradukitaj en Esperanton. Por interesitoj en sociaj kaj politikaj rilatoj en la Kaŭkazo antaŭ 120 jaroj havinda libro. Mendu ĉe la libro-servo de F. L. E. Marnixstr. 57 Harlemono. S.A.

Ni ricevis

JARLIBRO 1966 DE U.E.A., eldono de UEA Rotterdam. Amaso da informoj pri la Esperantomovado. Nemankipova adresaro.

BULTENO nro 31 de Internacia Klubo de I.O.O.F., eldonas P. Korte, Pr. Bernhardlaan 19, Veendam. Kiuj interesiĝas pri la ideoj en la Internacia Klubo de Odd Fellows-esperantistoj, turun sin al s-ro Korte.

SAT-JUNULFAKO

Novajo

Dum la pasinta kongreso de SAT en Britio, la Junulfako plurfoje kunvenis kaj pritraktis diversajn aferojn. Pri tio vi povas legi en la interesa sept./okt. numera de „La Juna Penso”. Se vi bone legis tiun numeron, vin certe trafis nova nomo en la listo de la perantoj.

Mian taskon nome transprenis *K-dino Corrie Kooy, Franselaan 270 b en Rotterdam-7.* (poŝtkonto 1256397).

Dum pluraj jaroj mi kun plezuro prizorgis la administradon de nia Junulfako, sed ĉar sin prezentis pli juna k-dino, mi volonte cedis mian postenon al ŝi. Mi esperas, ke ĉiuj nederlandaj abonantoj de LJP. zorgos, ke ŝi havus multe da laboro, i.a. pro la enskribo de novaj legantoj. Mi dankas ĉiujn, kiuj dum tiom da jaroj subtenis nin, kaj esperas, ke ili restos fidelaj al nia afero. Mía Maatman

El la distriktoj ★

GRONINGEN-DRENTE
Stephensonstraat 13, Groningen

Distrikta jarkunveno kaj renkontiĝo en la Natruamiko domo „De Hondsrug”, Noordlaren, la 11an de septembro 1966.

Je la 9.30 la prezidantino malfermis la kunvenon. Ŝi bonvenigis 14 partoprenantojn, inter kiuj tri ĝeneralaj anoj kaj ŝi ege bedaŭras ke ne partoprenas pli da ĝeneralaj membroj. La sekretario voĉlegis la protokolon, kiu sen rimarkoj estis aprobita.

Ricevitaj: de k-do Klaassens ke li ne povas ĉeesti kaj aliĝo de k-do R. Buys, kiu transloĝiĝis al Annen (Drente). Poste la sekretaria kaj kasista jarraportoj estis traktitaj kaj aprobitaj. Kontrolis la kasraporton la k-do v. Kempen kaj Musch. La kunveno kontentis pri la estraragado, kiu unuanime estis reelektita, krome estis elektitaj k-do R. Buijs kaj k-dino Hiemstra. La estraro konsistas nun el k-dino Minholts, prez.; k-do Buijs, 2a prez.; k-do de Jager, sekr.-kas.; k-do Welters, asesoro kaj k-dino Hiemstra, asesoro.

Pri la sekvonta renkontiĝo k-do Israëls proponis lasi la aranĝon al la estraro. Intertempe ni povis bonvenigi k-don J. Ph. Punt el Utrecht de la Asocia estraro. Je la 11a horo k-do Israëls komencis prelegi antaŭ ni pri Spinoza, la filozofa. En la unua parto Israëls skizis la vivon de Spinoza tre detale de lia naskiĝo ĝis kiam li estis plenkreska. En la paŭzo ni manĝis niajn buterpanojn, promenis en la belega ĉirkaŭaĵo kaj denove estis k-do Israëls kiu traktis Spinoza, liajn malfacilaĵojn spertitajn de li en la tiam fanatika eklezio pro siaj kontraŭaj ideoj. Estis ege interesa prelego. Superfluas diri ke la ĉeestantoj ĝuis pro ĝi, ĉar la silento dum la prelego estis preskaŭ aŭdebla.

Poste kelkaj partoprenantoj enverŝis teon kaj k-do Musch demandis al k-do Punt pri S.A.T. kaj pri nova vortaro. K-do Punt respondis detale ke jam multa laboro estis farita kaj ankoraŭ estos farata, precipe de k-do Faulhaber, krome estas ĝena monafero, pro kio li ne povis promesi baldaŭan aperigon de la vortaro. Rilate al S.A.T. k-do Punt povis plene kontentigi la demandinton.

Intertempe fariĝis la 4a horo kaj kun danko al k-do Israëls pro lia bonega prelego kaj al k-do Punt pro liaj detalaj respondoj, nia prezidantino fermis ĉi tiun agrablan kaj lernigan kunestadon.

C. de Jager, sekr.

NORD-HOLLANDO
Barrevoetstraat 7, Haarlem

La jarkunveno de nia distrikto okazos dimanĉo, la 23an de oktobro 1966, en hotelo „Het bruine paard”, Koemarkt 3, Purmerend. Malfermo 10.30 matene. Ĉiu sekcio kaj distrikto reprezentigu sin.

J. v. d. Horst, sekr.-ino.

ROTTERDAM
Boezemlaan 24b

En la membrakunveno, kiu okazis la 22an de septembro, ni sukcesis kompletigi nian estraron, kiu pro la morto de amiko Vollegraaf estis sen prezidanto. Nun la plena listo da estraranoj: k-do W. Quispel, prezidanto; k-dino A. C. Obbes, sekretariino, k-do J. Quispel, kasisto; k-do A. Haas, protokolanto kaj k-do J. Versteeg, asesoro. W. Quispel, konsilanto kaj reprezentanto en R.E.K. kun k-do B. Deichmann kaj k-dino A. C. Obbes.

AMSTERDAM
Curiestraat 22hs

La Amsterdama S.A.T.-rondo invitas kompreneble unualoke siajn membrojn, sed ankaŭ ĉiujn aliajn interesiĝulojn, je dimanĉmateno, la 30a oktobro, en la konata ejo en „De Leeuw”, Valkenburgerstraat 149, centra en la urbo.

Komenciĝo je la 10.00a horo. Dum tiu-ĉi mateno nia samideano Roel Kraefft rakontas pri: *la disvolvigo de la ĵunulargasteja movado.*

Tiel en Nederlando, kiel en la tuta mondo, kaj la situacio de Esperanto en tiu ĉi medio.

Kiel membro de la Plenum-Estraro de la N.J.H.C., li estas bone informita pri la temo. Kiuj konas lian seriozecon pri traktado de iu temo, scias, ke la partoprenantoj atendas interesan kaj instruan kunvenon! Ĝis la revido!

La 25an de septembro ni decidis daŭrigi niajn regulajn S.A.T.-matenojn dum la lasta dimanĉo de ĉiu monato, escepte dum decembro 1966 kaj marto 1967!

En bona harmonio ni ĉiuj kompilis la programon por la venonta sezono. Kelkaj malnovaj konatuloj revenos por partopreni en la programo, sed ni sukcesis altiri ankaŭ kelkajn, kiuj ĝis nun ne estas tiom konataj. K-dino Smit-Rous rakontis al ni pri siaj travivaĵoj al kaj dum la S.A.T.-kongreso en Swanwick kaj ni ĉiuj tial havis la fortan impreson, ke, kiuj ne partoprenis tiun kongreson, maltrafis eksterordinaran, bonsferan renkontiĝon.

Ankoraŭ-foje ni dankas k-dinon Smit-Rous pro ŝia interesa raporto! D. Veen

ROTTERDAM
2de Pynackerstraat 12a

Nia unua SAT-matena kunveno, kiu estis bone vizitita, ree okazis. Komence ni iom hezitis rilate nian ĉi-vintran programon, sed la ĉeestantoj donis al ni pli bonan esperon, ke ni certe ree sukcesos altiri prelegantojn.

En agrabla sfero rakontis al ni k-dino Obbes, k-do Quispel, Coppens kaj v. Alphen, pri siaj travivaĵoj kaj vojaĝproblemoj al kaj en la Swanwicka kongreso.

Kiel ĉiam k-dino Vollegraaf prizorgis la bonan kafon. Por la sekvonta programo ni havas jam preleganton (la 30an de oktobro), sed se eble, vi ricevos la programon, antaŭ tiu dato. Tamen ne forgesu veni al ni, venontan kunvenon en Strijensestraat, dimanĉmateno je 10.30 horo, la 30an de oktobro. M. Bout-v. Veen

Faulhaber-fondaĵo

Donacoj ricevitaj post antaŭa publikigo:

k-dino Schouten, Haarlem f 5,—
gek-do J. de Bes, Rotterdam f 3,60
k-do R. v. d. Outenaar, Haarlem .. f 30,—
k-do De Jager, Rotterdam f 1,50
k-do Van Alphen, Rotterdam f 1,50
gek-do J. Quispel, Rotterdam f 10,—
k-do W. Dekker, Amsterdam f 2,50
k-dino W. Klijn-Bekkink, A'dam .. f 2,50
k-do F. ten Hagen, Amsterdam ... f 2,50
Speciale ni petas vian atenton por k-do R. v. d. Outenaar, Merkmantstraat 5, Haarlem. Li ree sendis f 30,—, pro venditaj poŝtmarkoj.

Vi ĉiam povas sendi poŝtmarkojn al lia adreso, ankaŭ eblas kunporti ilin al kunvenoj de kie eblas senkoste havigi la poŝtmarkojn al v. d. Outenaar.

